# Novjorka Prismo

Numero 134 — Majo 2004


*La Esperanto-Societo de Novjorko kore invitas vin al sia maja kunveno . . .*

DATO: Vendredon, la 21-an de majo 2004, 6:30-9:00 ptm

LOKO: United Federation of Teachers
50 Broadway, Second Floor, Room A
(between Bowling Green and Exchange Place), NYC

PROGRAMO: 6:30 – Babilado kaj refreŝigaĵoj.

7:00 – *Esperanto en USSR post la morto de Stalin* (prelego de Alex Karkovsky okaze de lia sepdekjariĝo)

– *Historio kaj Tradicio de Islamo* (prelego de Asghar Sajadian). ★

## Protokolo de la kunveno de la 16-a de aprilo 2004

Je 7:08 ptm, Tomaso ECCARDT oficiale malfermis la kunvenon.

Rochelle F. GROSSMAN diris, ke 11 personoj ĉeestis la kunvenon en marto. Tuj poste, la protokolo estis akceptata.

Ĉeestis la aprilan kunvenon 16 personoj. Neniuj novaj gastoj ĉeestis, sed Asghar SAJADIAN el Vieno, Aŭstrio, origine el Irano, ĉeestis.

Tomaso anoncis, ke ĉi-sabaton ĉe Emma's Dilemma je la dua ptm okazos aŭ la 4-a aŭ la 5-a leciono de la komencanta klaso.

Li menciis, ke Arvidas revenos al Usono dum la somero.

Rochelle menciis, ke Rosa HELFGOT informis al ŝi pri latinamerika-kariba konferenco.

Arnold VICTOR menciis pri intervjuo je WBAI-FM kun Jesse HAIWA.

Tomaso LEONG anoncis, ke Boris Kolker intencas viziti Novjorkon komence de majo kun sia edzino.

Je 7:18 ptm, Jon LIECHTY, klasika pianisto, ludante per eletronika piano, kaj Tomaso MORGAN, jaza basisto, ludante per duobla baso, komencis sian prezentadon de ok muzikaj pecoj.

La unua kaj la dua kantoj komponiĝis per ĵaza komponisto Dave BENNIE, konatulo de Tomaso MORGAN. La titolo de la unua kanto estas *Fuss Around with Rain*, kaj de la dua kanto *Try* (Klopodu!).

Tom Morgan anoncis, ke li ludos en koncerto kun la komponisto la venontan mardon je la 10-a horo ptm. La nomo de la ludejo estas 55 Bar. La adreso estas 55 Christopher Street.

La tria kanto, *Shirin*, estas persa kanto pri virino. La kanto signifas, "Donu al mi kison. Se ne, mi prenos unu ĉiaokaze." Asghar diris, ke la kanto estas bone konata folklora kanto. Asghar eĉ 'dancis' en sia seĝo kaj klakis per la fingroj laŭ la ritmo dum la ludado de tiu kanto.

La kvara kanto, *Rehan*, estas azerbajĝana kanto. Rehan estas virina nomo, kiu signifas 'bazilion,' arom-herbo.

La kvina kanto estis azerbajĝana folklora kanto *Lolele*. En la suda parto de la lando, la nomo signifas 'tulipo,' en la nordo, 'papavo.' La kanto temas pri kazaĥa belulino. Jon eĉ kantis la vortojn, kaj kelkaj ĉeestantoj rimarkis, ke la lingvo eble parencas al la turka.



FOTOS: MAKI SANO

*Tom Morgan kaj Jon Liechty kune ludas dum la aprila kunveno.*

La sesa kanto, *Kiu Ĉojon Sentas Klaku per la Man'*, estas usona kanto. Tuj poste, Maki SANO, per la helpo de Tomoko YAMASHIRO, kantis la saman kanton japane, dum Jon kaj Tomaso ludis. Oni menciis, ke multaj japanaj infanoj pensas, ke la kanto estas origine japana kanto.

La sepa kanto estis "Kien Floroj Iris Jam", usona popolkanto, en kiu floroj estas simboloj de personoj, kiuj mortis dum la vjetnama milito.

Je la oka horo ptm, Jon kaj Tom ludis la lastan kanton, "La Espero", kiu estas la Esperanta himno. Ni kantis dum ili ludis.

Tuj poste, ni spertis teknikajn problemojn, kiam ni klopodis funkciigi la vidbendoprojekciilon. Ni povis nur aŭdi la dulingvan prelegon (en Esperanto kaj en la japana) kiun oni prezentis antaŭ grupo de Omotanoj en Japanio.

Je la naŭa horo ptm, post la oficiala fermo de la kunveno, Tomaso malkovris manĝaĵojn, restante de festo, en alia ĉambro. Unu el la ĉeestantoj de tiu festo invitis nin finmanĝi la manĝaĵojn. Do, ni restis tie ĝis la deka horo ptm, kaj ni ne iris al nia kutima restoracio. Tiu alia ĉambro estis multe pli granda ol la nia. Ĝi estis duobla ĉambro. ★

*Protokolis:*
*Stuart GREEN*

## IBM Plaza

Je la 2-a de majo ĉirkaŭ 10 geesperantistoj partoprenis la neoficialan kunvenon ĉe IBM Plaza. Vincent, franca juna partoprenanto, kiu praktikas sian fakon en iu komerca banko en Novjorko dum kelkaj monatoj, informis ke li reiros al Francio sabate je la 8-a de majo. Kelkaj partoprenantoj ankaŭ diskutis pri aktualaj sociaj aferoj en la mezoriento, precipe pri la konflikto inter Israelo kaj Palestino, kaj ankaŭ pri la sociopolitika problemo de Francio rilate al ties islamaj enmigrantoj. ★



*– Asghar SAJADIAN*

## Kio estas scienco? – Dua parto de la Resumo de mia februara prelego

*de Tom ECCARDT*

En la unua parto de tiu ĉi artikolo, oni diris ke scienco kaj matematiko estas du malaj polusoj de la fakoj kiuj produktas teoriojn. Temas pri kiel oni kontrolas la teoriojn: oni indukte pruvas matematikajn teoremojn, sed en scienco, oni povas nur esperi, ke la teorio ne falos pro kontraŭekzemplo. Sed kio pri filozofio, la alia fako kiu produktas puran scion? Filozofio tradicie ŝancelas inter matematiko kaj scienco, kaj tion ni povas vidi ekzamenante la historion de la filosofio de scienco.

La unuaj Grekoj ne klare distingis la tri fakojn, sed Aristotelo klopodis elemini filozofiajn antaŭjuĝojn kaj raporti nur tion, kion li observis. En la meza epoko, Roger Bacon rekomendis eksperimentojn, kaj ĝustan, detalan observadon. En la 16-a jarceno, dua Bacon, nome Francis Bacon, rekomendis eksperimentojn, induktan metodon, kaj la kontroladon de ĉiuj kazoj (eblecoj) por eviti teorojn bazitajn sur nesufiĉa informo. Iom post iom, oni standardigis sciencajn metodojn kaj scienco apartiĝis de filosofio kaj teologio. En Anglio, Francio, kaj Germanio fondiĝis sciencaj akademioj.

Tamen en tiu tempo la plej grandaj sciencistoj (ekz., Newton kaj Galileo) estis ankaŭ filosofoj pri scienco kaj inverse, eble ĉar oni ĉiam volis pli precize defini la celojn kaj metodojn de scienco. Newton rekomendis:

1. Evitu postuli kaŭzojn krom tiuj kiujn vi bezonas por klarigi la faktojn.
2. Havu minimumon de kaŭzoj, kaj re-uzu ilin por klarigi aliajn faktojn, se vi povas.
3. Kvalitoj de korpoj estu universalaj krom se oni povas malpruvi tion.
4. Gardu viajn regulojn ĝis kiam oni malpruvos ilin.

Tiuj lastaj du similas al tio kion modernaj scienc-filozofoj diras.

En la 19-a jarcento, sciencistoj jam postulatis la celojn de scienco: scio, kompreno, klarigo, kaj prognoza sukceso. Ankaŭ oni priskribis la procedurojn de scienco:

1. Klara priskribo de la problemo
2. Zorga komparo de teorioj kun faktoj
3. Senantaŭjuĝeco
4. Nesekreteco kaj replikebleco de rezultoj.

Finfine, la ĉefaj ecoj de scienco estis:

1. Uzado de kvantaj donitaĵoj
2. Uzado de artefarite kreitaj eksperimentoj
3. Intereso en leĝoj aŭ teorioj.

En tiu tempo, sciencistoj tiom bone priskribis siajn metodojn, ke ili opiniis, ke filosofio ne plu estas necesa. Jaluzaj filozofoj strebis igi sian fakon pli scienca, uzante simbolan logikon. Ankaŭ filozofoj klopodis derivi tutan matematikon de simbola logiko. Oni komencis kredi, ke sciencaj teorioj povus kreiĝi aŭtomate kaj rekte el observadoj. Ekzistis tri precipaj metodoj por antaŭenpuŝi sciencon:

1. Plimultigi scion (uzante la nunajn teoriojn)
2. Elimini falsajn teoriojn
3. Unuigi kaj redukti teoriojn (montri ke unu teorio estas nur speciala kazo de alia)

Tiu lasta nomiĝas "reduktismo." Reduktistoj esperis derivi kimion de fiziko, biologion de kimio, neŭrobiologion de biologio, psikologion de neŭrobiologio, kaj eĉ ekonomion de psikologio. Aliverte, oni esperis trovi iun teoriegon kiu kovros la tutan konatan mondon. Finfine, kelkaj kredis ke sciencaj malkovoj baldaŭ elĉerpiĝos. Oni intecas fermi la patentejon de Berlino. Hodiaŭ, multaj homoj havas 19-jarcentan opinion pri scienco, kaj foje oni aŭdas pri la "fino de scienco".

Oni ne devis fermi la patentejon de Berlino. Male, iu laboranto en la svisa patentejo malkovris la teorion de relativeco, kiu faligis la tiamajn teoriojn pri fiziko. Eĉ pli terure, oni malkovris la kvantuman teorion. La principo de necerteco, filo de la kvantuma teorio, detruis la certecon pri la fizika mondo, kaj ankaŭ pri scienco mem. Neniam malaperis la rekomendoj de Newton, la proceduroj de scienco, la ecoj de scienco, kaj la metodoj por antaŭenpuŝi scienco. Sed oni komencis tute redenki la filosofion de scienco, kaj pri tio temos la sekvonta parto de tiu ĉi artikolo. ★

## Societa Kalendaro

Venu al niaj venontaj renkontiĝoj!
Metu tiujn datojn en vian kalendaron.

**Majo 2004** **21**

ESNY KUNVENO

*Esperanto en USSR post la morto de Stalin*
(prelego de Alex Karkovsky)

*Historio kaj Tradicio de Islamo*
(prelego de Asghar Sajadian)

*Vendredon, 6:30 ptm ĉe UFT*

**Junio** **6**

**Tagmanĝo**

*Dimanĉon, 1:00 ptm ĉe IBM Plaza*

(Limdato por kontribuaĵoj por *Prismo* 135)

**?**

**ESNY PIKNIKO**

*La dato kaj la loko estos elektata dum la maja kunveno.*

United Federation of Teachers (UFT)
50 Broadway, Second Floor, Room A
(between Bowling Green and Exchange Place)

"IBM" Building Atrium (antaŭa nomo)
590 Madison Avenue (56th Street) NYC
Street level, in the Atrium

## Mesaĝoj de Paco

*Mia amiko s-ino MICUKAŬA Sumiko ricevis tiun peton de sia franca amiko. Ĉu vi povos kunlabori per via mesaĝo por paco? –Maki SANO*

Estimata samideano,

La 4-6-an de junio 2004 okazos en Parizo la "Unua Internacia Salono pri Pac-Iniciativoj". La esperantistaj asocioj de la Pariza Regiono partoprenos tiun manifestacion pere de speciala budo. La respondeculoj alvokas ĉiujn tra la mondo sendi mallongan mesaĝon. Tiujn mesaĝojn ni prezentos sur granda panelo. La DU LINGVAJ mesaĝoj (gepatra lingvo kaj Esperanto) temos pri paco. Jen kelkaj ekzemploj: – Deziresprimoj por paca mondo. – Kiel Esperanto naskas solidarecon inter la homoj. – Esperanto = lingvo de paco. – Kiom ŝanca vi estas vivi en paca lando . . . k.t.p. Bv. indiki viajn nomon, urbon kaj landon. Sendu al:

BONDY-ESPERANTO/Charles BILLARD
8, rue Martin Luther King/ F-93140 BONDY
(tel: +33-01-48 48 07 54) Antaŭajn dankojn. ★

– Charles BILLARD

## 70-Jariĝo de Alex



La 1-an de junio 2004 Alex Karkovsky festos sian 70-jariĝon. Alex lernis la Internacian Lingvon en Moskvo en 1957, inter la unuaj esperantistoj de la post-Stalina erao en Rusio. Li aktivis dum preskaŭ duono de jarcento, aperigis multajn artikolojn pri nia movado en la rusa, la angla kaj en Esperanto, en USSR kaj en Usono. Alex aŭtoris libron pri Esperanto kaj la Japana poeto Vasilij Jeroŝenko, ruse (Moskvo, 1978) kaj japane (Tokyo, 1983). Li lekciis en pluraj UEA kaj SAT kongresoj (1978, 1995, 1998, 1999, 2000, 2001). Li estas membro de ESNY ekde la jaro 1982. Vi kontaktu lin per unu el la adresoj: *<alexak@skyweb.net>, <alexak@yahoo.com>*. ★

*– J.M. laŭ informo de A.K.*


**ESPERANTO-SOCIETO DE NOVJORKO**
c/o UEA, 777 UN Plaza, NY, NY 10017 (212) 687-7041
http://www.geocities.com/esperanto_nyc

| | | |
|---|---|---|
| **Prezidanto**<br>Thomas Eccardt<br>(212) 477-6516 | **Korespondа Sekretariino**<br>Rochelle F. Grossman<br>(718) 457-1490 | **Protokolisto**<br>Stuart Green<br>(631) 751-5683 |
| **Vicprezidanto**<br>Thomas Leong<br>(718) 981-4252 | **Kasistino**<br>Sofiya Soskina<br>(914) 738-6084 | **Program-Direktoro**<br>Neil Blonstein<br>(212) 663-2020 |

**Novjorka Prismo**
Numero 134 – Majo 2004
ISSN: 1059-5627
http://members.aol.com/novjorka/prismo

| | | |
|---|---|---|
| **Redaktoro**<br>Jim Medrano<br>(212) 982-5029 | **Subredaktoroj**<br>Thomas Eccardt<br>Nancee Medrano | **Desegnistino**<br>Mary Pulley |

Sendu kontribuaĵojn al:
Jim Medrano, 400 East 20th Street #1B, New York, NY 10009-8103
e-poŝto: medrano@mac.com



© 2004 Esperanto Society of New York